
LA VERDA LUPEO





Informilo de ELF/AREK

Aprilo 2014 (46a jaro) N-ro 165

Esperanto Ligo Filatelista / Amika Rondo de Esperantaĵ-Kolektantoj

Redakcio: Rudolf Burmeister Max-Müller-Str. 86 DE 09123 CHEMNITZ





Sendita koverto antaŭ 100 jaroj (8 FEB 1914) el Munkeno kun nia unua talona Esperanto-pm.

La dua pm-talono tekstas pri lernejo por bierfaristoj (Brauer) en Munkeno

Teksto en la talono:
Vizitu la vegetaran gastejon „Esperanto“, la eldoradon por vegetaraj bongustemuloj!

La plej granda monumento de la mondo kreita por la Esperantisto Nikolao Kuznecov




Proksime al la rusa urbo Tjumen situas arbaro. En ĝi troviĝas 3 kilometrojn longa arbarpeco. Arbovicoj tie per 20 metrojn longaj literoj montras ekde la jaro 1977 la nomon KUZNECOV. Videbla tio estas nur el aeroplano. Li estis partizano kaj batalis kontraŭ la germana okupacia armeo.
Pro siaj meritoj li estis postmorte ordenita per plej altaj honorigoj de Sovetunio, i.a. per „Ordeno de Lenin“ kaj „Heroo de Sovetunio“. Pri li ekzistas multaj monumentoj. Asteroido kaj urbo portas lian nomon.




Kiel 15-jara junulo li eklernis Esperanton en Tjumen kaj estis membro de SEU kun la membronumero 47001. La sidejo de la klubo (kun Esperanto-biblioteko) estis en Irkutska Strato 17. Ĉe la enirpordo de la ligna dometo videblis la insigno de „Sovetlanda Esperantista Unio“. Laŭ pluraj fontoj (neesperantaj) Kuznecov flue parolis Esperanton kaj aktive partoprenis en la kluba vivo. En la 7a de Novembro 1926 li partoprenis en demonstracio. La Esperantistoj en Tjumen marŝis kun granda rubando „Vivu la 9a Jaro de la Granda Oktobra Revolucio“.

(Fonto: Letero de Jankowski)


Glumarko de S E U






Bildpoŝtkarto kun Kuznecov-monumento en la urbo Tjumen. Eldonita 1982.

La poŝtmarko (Michel-n-ro 3213) aperis 1962 en la serio „Herooj de Sovetunio“.





Memorkovertoj por Kuznecov

Dankon al s-ro Deitrich pro senditaj Kuznecov-filatelaĵoj.
Li estas prezidanto de „Internacia Laborgrupo Polico“
en la Germana Filatelista Asocio.





Rasmus Rask projektis internacian lingvon

En 1823 Rask, dana multlingvulo, projektis aposterioran planlingvon, kiun li tamen neniam mem publikigis. Rimarkinda estas la moderna argumentado de Rask por planlingvo en tiel frua tempo - nur en la dua duono de la 19-a jarcento estiĝis ondo da planlingvaj projektoj. Rask elpensis principojn por ideala internacia lingvo. Liaj principoj estas preskaŭ samaj al tiuj de L. L. Zamenhof, kvankam, ĉar la verko de Rask ne estis publikigita, Zamenhof ne konis ĝin.

Fonto:
Rasmus Kristian Rask: Traktatu d' un Linguaž universale =
Abhandlung über eine allgemeine Sprache =
Traktato pri ĝenerala lingvo.
II-a parto el la manuskripto "Optegnelser til en Pasigraphie" (1823).

El la postlasaĵo eldonita kaj komentita de Alicja Sakaguchi.
Frankfurt/M., Berlin, Bern k.a.: Lang, 1996

(El Vikipedio)






Moneroj en Nederlando memore al Willem Drees

Nia Hans Jankowski i.a. kolektas monerojn kun portretoj de E-istoj. Pasintjare li sukcesis akiri moneron pri Willem Drees. Tiu estis tre populara prezidento de Nederlando. Li faris salutparoladon en Esperanto dum la 39a UK en Haarlem kaj estis honora membro de UEA. Sed ĉu li vere scipovis Esperanton, ne certas. Sendube li estis simpatianto de Esperanto.
En la jaro 1998 aperis tri memorigaj moneroj pri li:

2 ½	**ecu**	**kupronikelo, diametro**	**33 mm**	
10	**ecu**	**kupronikelo**	**33 mm**	
25	**ecu**	**arĝento**	**38 mm**	**25 gramoj**



Willem Drees post la 2-a Mondmilito enkondukis en Nederlandon la sistemon de maljunula pensio. Kaj ĝuis ĝin ĝis sia 102a vivojaro...

Dum sia ofictempo kiel prezidento plej ofte li atingis sian rezidejon per biciklo.

Jen poŝtmarko memore al lia 100a naskiĝtago.

Bildkarto eldonita de Pekina Esperanto-Asocio



Lusin, la plej granda literaturisto de Ĉinio, fervore subtenis la Esperantan movadon. Li ne nur instruis en la Esperanta Kolegio, sed ankaŭ gastigis en sia hejmo rusan poeton-esperantiston Vasilij Eroŝenko, kiu instruis Esperanton en la Pekina Universitato. En ĉi-tiu foto farita en majo, 1922, en Beijing, estas Lusin (la tria de dekstre), V. Eroŝenko (la kvara de dekstre) kaj membroj de Esperanta societo.

Lusin: Respondo al la *Societo Mondo*, la 15an de aŭgusto, 1936

"...Mi estas konvinkita, ke mi firme aprobas Esperanton. Mi tion ekfaris antaŭ tre longe, eble jam antaŭ pli ol 20 jaroj. La motivo estis tre simpla. Laŭ mia memoro tion motivis nur, unue, ke per la lingvo oni povus unuigi diversnaciajn popolojn en la mondo, precipe tiujn subprematajn; due, ke, koncerne mian propran fakon, per ĝi oni povus reciproke konigi siajn literaturojn; kaj trie, ke mi renkontiĝis kun kelkaj esperantistoj, kiuj ĉiuj estas super egoistoj kun duvizaĝeco.
Tamen pri tio mi ne plu pensis poste. Tio do estas nur mia nuna opinio. Tiamaniere mi ofte estas. Mi diras ion bona, sed ne povas doni sufiĉe da kialoj por klarigi kial ĝi estas tia. Malgraŭ tio, finfine pruviĝos, ke mia juĝo estas ĝusta..."

Noto: Tiu ĉi teksto ĉinlingve troviĝas sur E-poŝtkarto aperinta en 2001.

Lusin kaj Zscheile en kunveno de esperantistoj en Kantono (1927)



Glumarko



„La erudiciulo estas nomata „X X“ (: Sai-er, Zeihile), germana verkisto. Li ekiris de Germanio *(Leipzig, r.b.)* la 1an de aŭgusto 1923 kaj piedire atingis, migrinte tra 27 landoj post tri kaj duona jaroj, la urbon Guangzhou (Kantono). La 23an de januaro 1927 la esperantistoj Huang Zunsheng, Sun Fuyan kaj aliaj okazigis kunvenon bonvenigantan lin. Ĝuste tiam la granda verkisto kaj fervora E-subtenanto LUSIN venis al la sama urbo kaj la E-istoj sukcesis inviti lin partopreni en la kunveno. Laŭ raporto de la ĉinlingva MINGUO-tagĵurnalo (1927 januaro 27) en la kunveno LUSIN faris paroladon pri Esperanto kaj la germana erudiciulo Zscheile parolis pri interesaj okazintaĵoj en la vojaĝo ...“

Hou Zhiping *en „Esperantomovado en Ĉinio“* (1985, China E-Eldonejo)
Tradukis el la ĉina: Qin Kaiji, Beijing, Junio 2004

Noto: Akompanis s-anon Zscheile (pr. Ĉajle) s-ano Wilhelm Pelz el Leipzig.

*= **„...Meze de januaro 1927 Lusin venis al Kantono kaj laboris kiel dekano de la Literatura fakultato de Zhongshan-universitato. Tiam en Kantono la Esperanta movado estis pli vigla ol tiu en Pekino kaj pli ol 20 lernejoj instruis Esperanton. Pli ol 2000 kantonaj esperantistoj montris varman bonvenigon al Lusin...“**

(El „Ĉina Reta Informo“)



Zscheile (Ĉajle) kaj Pelz (Pelc) en Tokio

Esperanto-filatelo sur paĝoj de NANJING PHILATELIE




Glumarka folio „89a UK 2004 en Beijing“

La filatela ĵurnalo de la Filatela Asocio de Provinco Jiangsu en 2011 kaj 2012 enhavis plurpaĝajn artikolojn kun multaj bildoj pri E-filatelaĵoj. Verkis ilin nia amiko SONG SHENGTAN. La ĵurnaloj ne atingis nin, sed kopioj de la koncernaj paĝoj.

……………………………………………………………………………………………

Prelego „La E-poŝtkartoj en GDR“ en konferenco de Germana Filatela Asocio



Germana Filatela Asocio okazigis en oktobro 2013 tri-tagan konferencon por specialistoj de tutaĵoj. Sur la programo ankaŭ estis prelego de la farmaciisto Krug pri „La Esperanto-poŝtkartoj de Germana Demokratia Respubliko“.

Li prezentis kompletan kolekton kun ĉiuj variaĵoj al la konferencanoj. Inter ili neniu E-isto. Eĉ li mem ne estas E-isto. Inter la kolektantoj de GDR-poŝtkartoj regas granda intereso pri tiuj E-poŝtkartoj. Pluraj special-katalogoj havas apartan rubrikon pri ili. Fonto estis la broŝuro „Esperanto kaj Filatelo en GDR“, eldonita 2009 de d-ro Detlev Blanke, Berlin.

Thema des Monats

Der Traum einer Weltsprache

Esperanto Auch wenn die Kunstsprache nicht den internationalen Durchbruch zu schaffen vermochte, ist sie philatelistisch weltweit dokumentiert.

Rund 125 Jahre sind vergangen, seit der polnische Arzt und Philologe Ludwik Lejzer Zamenhof seine Vorstellung einer einheitlichen internationalen Sprache verbreitete. Seine Idee fand seither weltweit viele Anhänger und wurde zum Thema zahlreicher Briefmarken-Ausgaben.

Der am 15. Dezember 1859 als Eliezer Levi Samenhof geborene Sohn jüdischer Eltern studierte Medizin in Moskau, Warschau und Wien, bevor er als Augenarzt tätig wurde. Von Jugend an interessierte er sich für Fremdsprachen. Warum sollte es nicht möglich sein, eine gemeinsame Sprache für Menschen aller Nationen zu schaffen, die für jedermann leicht erlernbar und verständlich war?

Unter dem Namen „Dr. Esperanto" veröffentlichte Zamenhof ab 1887 zunächst in Russisch seine Vorstellungen einer solchen „Internationalen Sprache", die nach seinem Pseudonym bald „Esperanto" (Hoffnung) genannt wurde. Von Russland, Deutschland und Osteuropa aus fand sie über Jahrzehnte hinweg Freunde rund um den Globus. Zum 90. Deutschen Esperanto-Kongress in Nürnberg im Mai 2013 erinnerte der Verband daran, dass hier die erste Esperantogruppe gegründet wurde und dass 1889 in Nürnberg die erste Zeitung in dieser Sprache erschien.

Eine ganze Reihe von Esperanto-Kongressen wurde bereits von speziellen Briefmarken-Emissionen begleitet. Doch schon zuvor gab die Postverwaltung der Sowjetunion im Oktober 1925 zwei Sondermarken zum 30. Jahrestag der Erfindung des Radios durch Alexander Popow heraus, deren Inschriften in Esperanto gedruckt wurden (MiNr. 300-301). Auch bei zwei Rubel-Werten der Freimarkenreihe „Bauwerke", die ab 1930 in Umlauf kamen, erscheinen die Inschriften zum Zentralen Telegrafenamt Moskau und dem Lenin-Wasserkraftwerk in Wolchow in Russisch und in Esperanto (MiNr. 392-393).

Die erste Sonderausgabe zum Thema der Veranstaltungen für Liebhaber der sogenannten „Plansprache" erschien gleichfalls in der Sowjetunion, aus Anlass des sechsten Internationalen Proletarischen Esperanto-Kongresses am 5. August 1926 in Leningrad (MiNr. 311-312). Die beiden Werte mit dem Moskauer „Obelisk der Freiheit" tragen Zeilen in Russisch, Esperanto und in Morseschrift.

Im Marken-Porträt seit 1927

Die philatelistischen Blüten zu Ehren seines Wirkens hat Doktor L. L. Zamenhof nicht mehr erlebt; er starb am 14. April 1917 in Warschau. Doch schon ab 13. Juli 1927 wurde er erstmals auf einer Briefmarke gewürdigt: MiNr. 325 der Sowjetunion zum Jubiläum „40 Jahre Esperanto" porträtierte ihn neben Industrieanlagen. Das Themengebiet „Esperanto" erstreckt sich seit den 1930er-Jahren bis nach Südamerika. In Brasilien kündigte die Post



Die erste Briefmarke mit einem Porträt des Schöpfers der Weltsprache erschien 1927 in der Sowjetunion.

die internationale Mustermesse in Rio de Janeiro ab 19. Oktober 1935 in Portugiesisch und Esperanto an (MiNr. 439 und 451). Für den neunten brasilianischen Esperanto-Kongress in Rio warb ab 19. Januar 1937 der Esperanto-Stern, umgeben von Fahnen der beteiligten Nationen auf MiNr. 466; und im September 1937 gab es eine weitere Sondermarke zu „50 Jahre Esperanto" (MiNr. 471). Der 10. Esperanto-Kongress in Rio de Janeiro 1945 (MiNr. 666-667) wurde ebenso bedacht wie der 66. Esperanto-Weltkongress 1981 in Brasília (MiNr. 1835). Nicht vergessen, aber nachgefeiert wurde der 100. Geburtstag von Ludwig Lazarus Zamenhof als „Autor des Esperanto" mit MiNr. 975 am 10. März 1960.

Österreichs Post setzte den Esperanto-Stern zum Österreichischen Esperanto-Kongress 1949 in Graz auf der grünen MiNr. 935 in Szene; gefolgt am 5. Juni 1954 von MiNr. 1005 zum Jubiläum „50 Jahre Esperantobewegung in Österreich".



Das 100. Jubiläum von Esperanto war der DDR 1987 sogar eine Blockausgabe wert.

Etliche Emissionen brachte Bulgarien in Umlauf, seitdem der 30. Esperanto-Kongress 1947 in Sofia durchgeführt wurde (MiNr. 597), bis zur Hundertjahrfeier der Esperanto-Bewegung in Bulgarien 1990 (MiNr. 3820). Jugoslawien, Polen und Ungarn beteiligten sich seit den 1950er-Jahren.

Hier wie anderswo wurde vor allem das Jubiläum „100 Jahre Esperanto" mit Neuerscheinungen gefeiert. Dazu trug die Deutsche Demokratische Republik sogar eine Blockausgabe bei: MiNr. 3106 in Block 87 vom 7. Juli 1987. Kuba, Malta, Surinam, selbst die Volksrepublik China beteiligte sich mit einer Marke am runden Geburtstag der „Weltsprache". Die Schweizer Post begleitete den Esperanto-Weltkongress 1979 in Luzern mit dem Motiv eines Heißluftballons zu 70 Rappen (MiNr. 1152). Und Belgien erinnerte 1982 mit MiNr. 2105 zum Weltkongress in Antwerpen an den Turmbau zu Babel, wo einst das „babylonische Sprachengewirr" entstanden sein soll...

Michael Burzan



Brasilien zeigte Dr. Zamenhof auf einem Luftpostwert zum Kongress 1945 in Rio de Janeiro.



In Litauen hat Esperanto noch heute eine Bedeutung, wie die Marke von 2005 signalisiert.





Jugoslawiens Esperanto-Marken von 1953 sind auch mit Aufdruck für Triest erschienen.

Artikolo en la filatela gazeto „Briefmarkenspiegel". Nov. 2013
Esperanto, sonĝo pri mondlingvo - Mondvaste filatele dokumentita

ESPERANTO
Traum einer Weltsprache

BMS-GEWINNSPIEL
Freifahrscheine für den Postbus

www.briefmarkenspiegel.de

BRIEF MARKEN SPIEGEL

...mit Sonderheft MÜNZENMAR

Das aktuelle Briefmarken-Magazin

Parto de la titola paĝo 10/2013

En ĝia eldono de januaro 2014 aperis dupaĝa artikolo pri la Esperanto-filatelo kaj ĝiaj elstaraj raraĵoj... denove el la plumo de Mikaelo Burzan

Markt-Spiegel

Esperanto-Spezialitäten

Sowjetunion bis Triest B Spitzenstücke können heute vier- bis fünfstellige Beträge kosten.

Aperis 2 ipm de IPA-sekcio Francio kun la teksto SERVO PER AMIKECO



Retpoŝte min atingis flugfolio de la franca IPA-sekcio kun sciigoj pri eldono de du individuaj poŝtmarkoj okaze de „60 jaroj IPA-sekcio Francujo“.
Ĝi fondiĝis la 18an de Septembro 1953 kaj nun havas 2500 membrojn.
La markoj montras modifitan IPA-emblemon kun la enskribo:
SERVO PER AMIKECO.

`IPA: International Police Association`





1967: E-renkontiĝo kadre de jubilea pm-ekspozicio en Karl-Marx-Stadt

Supre meze: Klaus Urban, Rolf Deke - Sub ili: Familio Grimm kaj familio Thomas

Sube: Bartoŝik, Tichy kaj s-ino Strönne - super ili: Ivar Paulsson kaj familio Heimann



Salutkarto sendita de Anna-Greta Strönne al Kurt Lindström

kun subskriboj de Vladimir Vana, Ivar Paulsson kaj R. Burmeister


Jubiläums-Briefmarkenausstellung
„50 JAHRE ROTER OKTOBER" KARL-MARX-STADT 1967
80 jaroj de ESPERANTO lingvo internacia
Teilnehmerkarte
für Burmeister, Eva-Maria
zum ESPERANTOTREFFEN
7. und 8. Oktober 1967
III/6/47 Kv 543 67 9

1967: Jubilea Pm-ekspozicio en Karl-Marx-Stadt, GDR, kun E-konferenco kaj E-filatela simpozio omaĝe al „80 Jaroj Esperanto“

Kadre de tiu E-konferenco okazis aparta renkontiĝo de E-filatelistoj dum tuta semajno. Ĉirkaŭ 30 E-filatelistoj el pluraj landoj partoprenis. Krome ĉeestis la folklora ensemblo de la Ŝkoda-uzino en Plzen.

En la naciranga ekspozicio partoprenis 5 E-temaj ekspozaĵoj inter 150 alitemaj elmontroj. Krome okazis E-ekspozicio en du grandaj salonoj de la urba muzeo. Aperis memoriga poŝta stampo kaj pluraj por-okazaj glumarkoj.

En interparoloj („kunsidoj“) la filatelistoj diskutis pri fondo de klubo por kolektantoj de Esperantaĵoj kaj interkonsentis fondi tian klubon. Sed mankis iu deklaracio pri fondiĝo... tio okazis nur jaron poste, sed fakte nur teorie.. sole de unu persono, lige kun la apero de numero 1 de „FENIKSO“. Pri la nomo de la klubo jam jaron antaŭe ni interkonsentis, ke ĝi estu: ***Amika Rondo de Esperantaĵ-Kolektantoj = AREK.***



Sed ELF-AREK „naskiĝis“ nur en majo 1974, per kuniĝo de AREK kun ELF, kiu ekestis 1963 en UK de Sofio i.a. kun s-anoj Koĉvara, Wenclewski kaj Heimlich. Prezidanto estis Hermann Heiss, ankoraŭ nun li kaj Werner Heimlich membras en nia klubo. Kiam do nia klubo fondiĝis? ĉu 1963, 1965, 1967, 1968 aŭ 1974? Por mi en momento plej plaĉa: 1963... tiam nun ni povus festi 50jaran jubileon.



Hermann Heiss

Kunfondinto, prezidanto de ELF

IPM JA 01	**2006 sept.**	**80 e.**	**“Bonan Tagon“- portreto s-ro Tuĵi**	**nekonata**
IPM JA 02	**2006 sept.**	**80 e.**	**Gauntlett** (2 var.)	**800 p. + 600 p.**
IPM JA 03	**2007 marto**	**80 e**	**94a Japana E Kongreso** (6 var.)	**nekonata**
IPM JA 04	**2007 aŭg.**	**80 e.**	**92a UK** (2 var.)	**nekonata**
IPM JA 05	**2007 aŭg.**	**80 e.**	**Esperantista Go-Ligo**	**nekonata**
IPM JA 06	**2008 junio**	**50/80**	**56a E-kgr. de Kansajaj E-istoj**	**nekonata**
IPM JA 07	**2008 okt.**	**50/80**	**95a Jap. E-kongreso (**5x50, 5x80, 5x gr. 80)	**nekonata**
IPM JA **	**2009 junio**	**50/80**	**150 jaroj Zamenhof** (5/2 kolorvar.)	**2x1500 pecoj**
	A = kun ruĝa sigelo B = sen sigelo La 80-ena aldone pli granda: 40x47 mm 500 pecoj			
IPM JA **	**2009 okt.**	**50/80**	**96a Jap. E-Kongreso** (5 var.)	**2x1500 pecoj**
IPM JA **	**2010 junio**	**50/80**	**58a E-kgr. de Kansajaj E-istoj**	**2x1500 pecoj**
			50: 5 var., 80: 2 var. + 5x80 pli granda 40x47 = 500 p.	
IPM JA **	**2010 okt.**	**80**	**Mistler (E-isto)** (5 var.)	**nekonata**
IPM JA **	**2010 okt.**	**80**	**Ossaka (E-isto)**	**nekonata**
IPM JA**	**2010 okt.**	**5ß/80**	**97a Jap. EK** (5x50. 2x80, 5x80 gr. 1x80 striita)	
IPM JA **	**2011 marto**	**50/80**	**125 Jaroj E** 50: 5 var. verda fono, + 5 var. blanka fono, + 80: 5 var	
IPM JA **	**2011 junio**	**50/80**	**59a E-kgr. de Kansajaj E-istoj**	**nekonata**
			50: 5 var., 80: 5 var. + 1 striita 80	
IPM JA **	**2012 julio**	**50**	**Korea -Japana E-kgr.** (5 var.)	**nekonata**
IPM JA **	**2012 aprilo**	**50/80**	**E-Domo Yatugatake** (5x50, 6x80)	**nekonata**
IPM JA **	**2012 aprilo**	**50/80**	**E-Domo Jacugatake** (5x50, 1x80)	**nekonata**
IPM JA **	**2012 okt.**	**50**	**99a Jap. EK (Lupoj)** (5x50)	**nekonata**
IPM JA **	**2012 okt.**	**80**	**Sama (Ursoj)** Striita kadro	**nekonata**
IPM JA **	**2012 okt.**	**80**	**Sama (Cervoj)** Striita kadro	**nekonata**
IPM JA **	**2012 okt.**	**80**	**Sama** Kadro-steloj	**nekonata**
IPM JA **	**2012 okt.**	**80**	**Sama** Kadro-floroj	**nekonata**
IPM JA **	**2012 okt.**	**50**	**Sama (Strigo)** (5 var.)	**nekonata**
IPM JA **	**2012 okt.**	**50/80**	**Sama (Stampobildo)** (5x50 + 1x80)	**nekonata**
IPM JA **	**2012 okt.**	**50/80**	**Sama (Urso kaj 125)** (5x50 + 1x80)	**nekonata**
IPM JA **	**2013 aprilo**	**50/80**	**E-Domo Jacugatake – 2013**	**nekonata**
IPM JA **	**2013 majo**	**50/80**	**61a Kansaja EK**	**nekonata**
			(5x50 + 5x80 + 1x80 striita + 2x50 floroj-steloj))	
IPM JA **	**2013 okt.**	**50/80**	**Ossaka -2013** (5x50 + 1x80)	**nekonata**
IPM JA **	**2013 okt.**	**50/80**	**100a Japana EK** (5x50 + 1x80)	**nekonata**
IPM JA **	**2014 majo**	**...**	**62a Kansaja E-kgr ...**	

(Talonoj)

IPMT JA 01 2003 aprilo 80 enoj Memportreto s-ro Tuĵi/Tokio Bazfolio kun 10 div. pm

IPMT JA 02 2005 03 06 50/80 e. 53a kgr. de E-istoj en Kansajo (10 div.)

2x50 (ru,bl), 5x80 (floroj), 3x80 (rido,ĉielo blua, ru)


IPMT JA 03 2005 21 10 50/80 e. 92a Jap. E- Kongreso 2x50 ru.blua. vezikoj, 5x80 floroj

IPMT JA 04 2005 01 07 50 enoj E-stelo / kolombo ruĝa kaj blua pm vezikoj

IPMT JA 05 2006 01 09 50 enoj 3 E-steloj / kolombo ruĝa kaj blua pm vezikoj

IPMT JA 06 2007 01 04 50/80/90 92a UK 2v50, 2x80, 5x80 floroj. 1x90 (10 div.)

IPMT JA 07 2007 03 04 50/80 94a Japana E- Kongreso (16 div.)
2x50 ru, blua, floroj: 80: 5 sur blua + 5 sur kolora fono
2x80 ora k arĝ. kun kolora fono, 2x80 ora kaj arĝ. sur blua fono



La unuaj 10 individuaj E-pm-oj el Japanio, 2003, de sinjoro Tuĵi
(Katalogo SAKURA 2012 - bazfolio: numero PH 1)



Detaloj: 4x4 cm, memglua; koloroj: blua, verda, lazurmara sur blanka

"Petolema verda stelo ĉirkaŭflugas la obeliskon, plej reprezentan simbolon de Bonaero, ellasante 99-forman spuron. Du tonoj de bluo, hela kaj lazurmara, reprezentas respektive la ĉielon de Argentino kaj Atlantikon, ĉe kiu la lando kuŝas."

Tiel klarigas ĝian signifon Francisco Luis Veuthey, kiu ĝin dezajnis.

Tiu klarigo videblas en retpaĝo de UEA. Bone, ke UEA almenaŭ daŭrigas la tradicion aperigi memorigajn glumarkojn pri la Universalaj Kongresoj.
Pri memorigaj poŝtaj stampoj tion ne eblas diri.
Certe la kialo estas la altaj kostoj por mendo de stampo ĉe la poŝto.










Por aktualigi vian stampo-katalogon nia kluba amiko Haruja Maekaŭa pretigis suplementon. Videblas jam la stampo n-ro JA 48, uzota 2014 31 05 – 01 06 en urbo Himeji por la


62a Kongreso de Esperantistoj en Kansajo

Detalojn pri la aliaj stampoj vi trovas en niaj aperintaj LVL ekde 2003.

2013 en Pollando: 4 Poŝtkartoj „ Konkurso“

„...Pasintjare en Pollando estis eldonitaj 4 poŝtkartoj okaze de konkurso sub titolo „Esperanto – lingvo de amikeco...“
Interesuloj turnu sin al St. Biesiada en Czestochowa. Vidu p. 20








Rumanio 2006

Memoriga poŝtkarto okaze de 10 jaroj IPA-sekcio Rumanio kun emblemo de IPA. En ĝi la teksto en E: SERVO PER AMIKECO. (Maldekstre en la karto) Trovita ĉe ebay-aŭkcio.



Poŝta stampo kaj poŝtkarto SERVO PER AMIKECO el Pollando

Antaŭ jam 12 jaroj funkciis en Plock, Pollando, poŝta stampo okaze de la 10-jara jubileo de sekcio de Internacia Polica Asocio en regiono Plock. Akompanis ĝin memoriga poŝta karto. Ambaŭ kun la enskribo: SERVO PER AMIKECO en la emblemo de I P A .
Dato en la stampo: 04.10.2002 Dankon al s-ro DEITRICH.



En la suba rubando: SERVO PER AMIKECO



ELF-AREK

Esperanto-Ligo Filatelista
Amika Rondo de Esperantaĵ-Kolektantoj

Prezidantino:
S-ino Elda Doerfler
Via Ghirlandaio 18/1 IT-34138 TRIESTE

>testudo.ts@gmail.com<

ATENTU! Via kotizo! Ne plu ekzistas nia bank-konto en Germanio.
Bonvolu sendi vian kotizon nur al nia UEA-konto.
Se vi ne havas aliron al nia konto ĉe UEA, bonvolu kontakti nian prezidantinon.
UEA-konto: ELF/AREK = Kodo: elfx/r
Jarkotizo: € 17.00 - Membroj en socialismaj kaj ekssocialismaj landoj: € 15.00

La Klubo de Amikoj de Esperanto en Svitavy (CZ)

kun la loka klubo de filatelistoj aranĝas regionan filatelan ekspozicion kun aparta „Esperanto-salono“ en Svitavy, 25-28.9.2014. La organiza komitato kreis tre interesan paĝaron en la ĉeĥa kaj Esperanto: www.svitavy2014.estranky.cz
En ĝi legeblas ĉiuj detaloj. Rajtas partopreni alilandaj filatelistoj per filatela E-ekspozaĵo (kun ekspozicia pasporto).
Samideanino Libuše Dvořáková, kiu estas membro de la organiza komitato, varme invitas al partopreno.

Vizitu la retpaĝon: http://bit.ly/Babelo

Tie videblas la E-filatela kolekto „Babelo estu detruita“. Ties plej alta ricevita medalo estis Granda Vermejlo en internacia ekspozicio kaj havis lokon eĉ en la FIP-ekspozicioj de Kopenhago kaj en Belgio.
Se vi bezonas pli akuratan bildon de iu peco, J. R. Piton sudastelaro@gmail.com jam enretigis en alian lokon la foliojn en 300-piksela akurateco. Li disponigos tion al unuopuloj kun speciala intereso (kiel produkti grandan afiŝon, ekzemple).

Deziras aĉeti la stampojn:

München 8b – 1948, Oslo 1961, Leipzig 1929, London 1930 (SAT), Stockholm 1933, Beograd kaj Sarajevo 1959 : "Ucite Medjunarodni Jezik Esperanto" kaj kolorajn bildkartojn eldonitaj okaze de la E-kongreso en Evreux 1952
Stanislaw Biesiada skr. 599 PL 42-217 Czestochowa-17 Pollando